maar 't vogeltje zingt onbevreesd :
joho joholdriho,
voor 't hart is het nu liefdefeest,
joholdriholdriho !

Hij voelt zijn hart zo wonderklein
maar zijn ontroering groot,
ontrooft dan fluks een kusje fijn
die lippen ongenood,
en 't vogeltje zingt onbevreesd :
joho joholdriho,
voor 't hart is het nu liefdefeest,
joholdriholdriho !

En weerom dwaalt die jongling voort,
al lachend om zijn schroom,
terwijl het meisje onverstoord
droomt verder bij de boom.
En 't vogeltje zingt onbevreesd :
joho joholdriho,
voor 't hart is het nu liefdefeest,
joholdriholdriho !

vertaald door H. VERMUYTEN

S-ino
J.A.M. MABESOONE-HAARMAN
La 4-an de jan. subite mortis, 48-jara, s-ino J.A.M. Mabesoone-Haarman, kiu antaŭ la milito prizorgis la libroservon de nia asocio kaj kiu ankaŭ post la milito regule vizitis niajn kongresojn kaj plurfoje aktive partoprenis en ĝiaj programoj. Okaze de la solenaĵo en Westerveld, kiun multaj gesamideanoj ĉeestis, s-ro P. W. Baas parolis nome de L.E.E.N. dankvortojn pro la meritoj, kiun s-ino Mabesoone havis en nia asocio. Ni elkore kondolencas nian ĝen. kasiston s-ron Mabesoone kaj lian filon.

INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ.
EN KERK-AVEZAATH.

La Estontista Nia kaj Flandra Ligo Esperantista organizos internaciajn feriajn kursojn en Kerk-Avezaath apud Tiel (Nederl.).

La kursoj, kiuj okazos de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto en konferenĉejo Weltevreden, estos gvidataj de s-ro T. Morariu (rumano), s-ro d-ro Th. v. Gindertaelen (flandro), f-ino H. M. Mulder kaj s-ro mag. A. J. Kalma (nederlandanoj). Okazos konversacia kurso por komencantoj, kiuj trastudis lernolibron kaj deziras parolekzercon, konversackurso por progresintoj, seminariaj lekcionoj por estontaj kursgvidantoj kaj lekcionoj pri literaturo, historio, lingvo, stilo, k.t.p. Oni laŭplaĉe povos partopreni en unu aŭ pluraj kursoj, sed ankaŭ feriaj gastoj, kiuj deziras partopreni nur la ekskursojn, k.t.p. estos bonvenaj. Vespere okazos amuzaj aranĝoj kaj prelegoj. Planita estas i.a. dana vespero, kiun prizorgos la danaj partoprenantoj. Prelegos i.a. S-ro G. Aström (svedo) kaj s-ro d-ro W. J. Manders.

Projektitaj estas kelkaj ekskursoj, i.a. ŝipveturo sur rivero Waal al Nijmegen kaj vizito al fabriko en Eindhoven (Philips) kaj Leerdam.

Ĉiuj kursanoj loĝos kaj manĝos en Weltevreden, kie estas loko por 100 partoprenantoj.

La kurskotizo (g. 35.—) inkluzivas ĉiujn elspezojn por loĝado kaj manĝoj.

Oni anoncu sin ĉe s-ro P. W. Baas, C. Krusemanstr. 43, III, Amsterdam.

En februaro aperos detala prospekto. Ĉiuj partoprenantoj poste ricevos detalan programon kun ĉiuj necesaj informoj.

Notinde estas la kritika rimarko pri la reorganizo de la L.K. kaj Akademio : «... estas necese, ke la movado kiel tuto, iel povu influi la organizan funkcion kaj la konsiston de la lingvaj institucioj». Ĉu ni preferu ne komencu per racia kaj pli intima kunlaboro inter la movadoj, por komunaj esperanto-celoj, antaŭ ol espere antaŭkalkuli profiton por la movado « kiel tuto » ?

TYN.

PROPAGANDO DE ESPERANTO de Dro J. Székely, eld. Esp. Film-Grupo, Bergen-op-Zoom (Nederland), 1948, 26 p. Havebla ĉe F.E.I., 21 b.fr. ; ĉe Libro-Servo LEEN f. 1,25.

Ĉiu serioza Esperantisto nepre legu ĉi tiun broŝuron ! Ĝi prezentas la propagando-planon de la aŭtoro, kiu ĝin disvolvis okaze de la Berna U.K. ; la Malmö-a U.K. jam komencis ĝian efektivigon.

Ni staras antaŭ jenaj problemoj :

1) Esperanto, malgraŭ multega propagando, atentindaj sukcesoj kaj disvastigo, ankoraŭ malproksimas de la celo kaj postulas ankoraŭ plian multegan propagandon ;

2) Certaj propagandmaniero ne plu taŭgas ĉar epoko kaj homaro ŝanĝiĝas.

La aŭtoro montras kion kaj precipe kiel fari. Propagandistoj kaj E-grupoj gajnu tempon, studante la verketon.


Devige nekompleta, la aŭtoro tamen donas amason da interesaj ideoj, kiujn ĉiu propagandisto uzos kaj perfektigos, se eble. Precipe gravas la parto kie li montras kiel fari : temas pri raciigo de la propagando. Homaron, kiu akceptas nur tion kion trudas forto kaj tion kio kuntiras amason, trafu planita, direktata, centrigitaj, ĉie samtempe kaj grand-skale organizita propagando.

Papero bonega, presita klara kaj praktika formato.

LAPONOJ KAJ FINNOJ, el la nederl. S-ino H. A. M. Huyghens de Groot, (priverkis : J. F. C. M. Derckx), Filmbendo 186/19 16p., eld. E-Film-Grupo, Bergen-op-Zoom. Havebla ĉe F.E.I. : 128 b.fr. (kun filmo) ; ĉe LEEN Libro-Servo : f. 7,75.

DANUJO, el la nederl. H. A. Appel, filmbendo 19/27, 19 p., sama eldonejo. Havebla ĉe F. E. I. : 124 b.fr. (kun filmo) ; ĉe LEEN Libro-Servo, f. 7,50.

Ambaŭ verketoj prezentas tre interesan disvolvon, kvankam ne ĉiam tute aktualan. Tre korekta teksto, presita klara kaj plaĉa prezento.



LETEROJ DE L.L. ZAMENHOF (La Tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj), prezentado kaj komentario de Prof. G. WARINHIEN, I-a parto (1901-1906), eldonis S.A.T., Paris, 1948 XVII + 367 p. formato 14,5x20, bind. Havebla ĉe F.E.I. Brusel : 150 b. fr. ; ĉe L.E.E.N. libro-Servo : f., 7,80.

Komence de la XX-a jarcento, Francujo brile transprenis de la Oriento la gvidadon de la Esperanto-movado. Scienculoj, filozofoj, lingvistoj, universitatanoj entuziasmiĝis pri Esperanto kaj domaĝis nek penon, nek tempon, nek influon, nek monon por propagandi ĝin, por disvastigi ĝian uzadon.

Tamen tiu prospera florado estas grandparte nur flata ŝajno. Malfido, jaluzo, rivaleco apartigas la gvidantojn kaj la Majstro bezonas sian tutan takton, mildon, paciencon por antaŭhaltigi minacantan rompon inter homoj kun mankoj, jes, sed ankaŭ kun laŭdindaj meritoj. Kaj Zamenhof sukcesas, almenaŭ provizore.

Tiun parton de la historio de la Movado en Francujo inter 1901 kaj 1907, kiel ankaŭ fundan analizon de sia propra personeco Zamenhof mem skribis - senintence - en siaj grandnombraj, ĵus retrovitaj leteroj al la francaj eminentuloj, precipe : Michaux, Bourlet, Javal. Sufiĉis al prof. Waringhien kompletigi ilin per trafa enkonduko kaj kelkaj tekstoj el aliaj tiutempaj fontoj. Malmulta, sed alcela komentario de la kunmetinto provizas la interligan fadenon kaj kreas la necesan unuecon en la libro.

Post preskaŭ 20 jaroj da senĉesa penado, Z. fine sukcesis formi al si medicinan praktikon, kiu ebligis per streĉa laboro gajni la vivpanon por sia familio. Sed ĉiam li senrezerve for - oferas trankvilon kaj ripozon por sia korinfano, Esperanto. Li vigle korespondas tiel pri Movado, kiel pri lingvo. Li verkas, tradukas. Li kontrolas manuskriptojn por la Kolekto Aprobata. Kaj ruinigas sian sanon.

Jen leviĝas konsola lumpunkto : la unua kongreso en Bulonjo, 1905. Esperanto glorie eltenas la provon, pravas sian taŭgecon. Sed dume premadas la lukto kun la eldonejo Hachette. Z. konscias, ke same malutilos al Esperanto :

komplete rompi kun postulema eldonejo, aŭ rezigni sian liberon. Li savu ĉion saveblan.

La lingvo tamen ne estis lia sola revo. Eĉ ne la plej grava. Li esperis, ke lia Hilelismo iam repacigos la homaron. Esperanto mem estus nur rimedo. Sed jam baldaŭ lin frapas la konvinko, ke por Hilelismo ankoraŭ ne estas loko en la koro de la homo. Eĉ ne por ĝia pli pala alĝustigo : Homaranismo. Dume, revolucio teruras Varsovion, kaj Bialystok sangas pro sovaĝa buĉado.

Nova, plej danĝera rifo elmergiĝas : sopiro al reformoj. Supersignaj literoj, artefaritaj korelativoj, la akuzativa N, k.s., ĝenas kelkajn eminentulojn. Z. tute ne havas despotan naturon. Li mem scias, ke lia lingvo ne estas perfekta, kaj ne pro malhumila obstineco li repuŝos reformojn. Sed 19-jara sperto lin konvinkis, ke rompaj reformoj signifos definitivan disfalon de Esperanto. Neniam la mondo alprenos helplingvon ne stabilan. Eble proponata plibonigo teorie aspektas sendifekta, tamen « griza estas ĉiu teorio, la praktiko estas la ĉefaĵo ». Vane li provas persvadi siajn amikojn, ke fundamentaj ŝanĝoj estas antaŭtempaj. Tiam pro komplezo, li mem ellaboras projekton respondan al ilia insista pledado. Kaj tutsincere promesas sin submeti al la decido de la plimulto. Peza ŝtono defalas de lia brusto, kiam la konservativuloj petas, ke li retiru la projekton.

Sed baldaŭ ekagos la Delegacio...

Kiun la historio de Esperanto interesas, tiu vere ĝuos la multinstruan, plurloke kortuŝan enhavon en inda eldono, kaj senpacience atendos la Duan Parton.

Fr. C.

GVIDILO TRA LA ESPERANTO-MOVADO — G. P. De Bruin. Suplemento 1936-1948 — Eld. S.A.T. kaj F.L.E. — Parizo-Amsterdamo — 1948, 16 p.

Sendube montriĝis la neceso kompletigi la antaŭmilitajn informojn pri la Esperanto-movado. Post la detala historia bildo de Stop-Bowitz, jen suplemento, kiun precipe la posedanto de la suprenomita « Gvidilo » (1933-1936) ne povas malhavi. La vigla nederlanda laboranto, s-ano De Bruin, koncize priskribas en ĝi la periodon 1936-1948, akcentante la laboristan movadon.

LA ESPERANTO-MOVADO (ĝia historio, organizo kaj nuna stato) de C. STOP-BOWITZ kaj ir. J. E. G. ISBRÜCKER. eld. E.- Forlaget A/S (Oslo), 1948, 58 p., prezo nemontrita.

Sin bazante sur la samcela, en 1938 por la tria fojo eldonita, verketo de ir. Isbrücker, la aŭtoro Stop-Bowitz reverkis ĝin por la norvegaj kandidatoj al Esperanta diplomo. Tial la specialan skizon pri la organizo en Nederlando anstataŭas informoj pri la movado en Norvegujo kaj la aliaj nordaj landoj (ĉi tiuj verkitaj de enlandanoj Skog, Noll, Setälä, de Saemundur v. Forsdal).

La prezentita historia resumo logike kaj instrue enicigas la konindajn faktojn en mallongajn ĉapitrojn laŭ la ĉefpartoj : ideo de internacia lingvo, historio de Esperanto-movado kaj lingvo. Iuj detaloj aldoniĝis, aliaj malaperis ; i.a. la ĉapitro pri Esperanto inter la katolikoj ŝrumpis ĝis 10 linioj kaj « demandoj pri ekzerco » ne plu sekvas. Ni ree ekhaltis antaŭ la kurioza rusa multe citata vorto ŝveĵarskaja, ŝajne signifanta samtempe pordestejo (kiel ĉe Privat), drinkejo (Lingvaj Respondoj) kaj trinkejo (Dietterle)...

Ne nur ekzamenotoj trastudu la utilan bonpresan libron, sed ankaŭ la honestaj samideanoj, kiuj ĝis nun nekonscie vivis, kvazaŭ nesciantaj infanoj, ĝin profite legu. Ne ĉiuj informoj edifos sed ili kuragiĝe montros, ke nia idealo neestingeble lumadas, foje eĉ malgraŭ la Esperantistoj. La faktoj estas sufiĉe nekomplicke, eĉ plastike esprimitaj (ekz. « dum la dua mondmilito... » IEL sidis en militanta lando, Anglujo) ; sur aparta listeto la preseraroj estas korektitaj kaj la freŝdata decido jam menciita, kiu feliĉigos la Lingvajn Komitatanojn per la titolo « Akademiano ».

TYN.

1949 KALENDARO, por membroj de G.E.A., eld. Germana Esperanto-Asocio, München 23 (Germ.), postfako 27, 64 p. Havebla ĉe la eldonejo, prezo : 80 pfg aŭ 3 rpk.

Kun praktika formato (14,5 x 10,5 cm), la libreto enhavas, krom la kalendarajn elementojn, informojn pri la stato kaj estraro GEA kaj multaj ĝiaj komitatoj, pri liga, grupa, membra kaj internacia adresaroj kaj listo de E. Gazetoj, ktp.

Ĝi estas presita sur bona papero kaj sen eraroj kaj atestas la viglan E. vivon de GEA ; ĝi interesos ĉiujn Esperantistojn, kiuj nepre mendos ĝin.

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

LA PREMION gajnis post n-roj 53-54: s-ano A. Lodema, el Amsterdam.

SOLVO de la n-ro 55.

HORIZONTALA. 2. arane; detal. — 3. gum. — 4. aĉeti; infan. — 5. ja; ni. — 6. poŝtmarko. — 7. rul. — 8. tost; kned. — 9. blu. — 10. — lerta; lieno. — 11. zum.

VERTIKALE. 1. parad; stult. — 2. ĉap. — 3. vane; observ. — 5. registr; baz. — 6. muel. — 7. admiral; ulm. — 9. ŝtof; konven. — 10. ano. — klini; idiot.

GUSTIGO.


Pro 3 eifalintaj difinoj, la solvo de la n-ro 56 ne eblis. Ni ilin represas, kaj atendas la solvon kune kun la solvoj de la ĉi-monataj enigmoj.

HORIZ. 2. fantazio (R); konformiĝi (R). — 5. sufikso (R); sufikso (R).

VERT. 9. difini la valoron (R); deziranta havi informojn (R).

N-ro 57. KRUCVORTENIGMO.

HORIZONTALA. 1. uzi en speciala okazo (R); promesi malbonaĵon al iu (R). — 2. antaŭ la deka. — 3. kredi, ke tio, kion oni deziras, realiĝos (R); tute ne inteligenta (R). — 4. iam li estis fraŭlo (R). — 5. kuseno estas tia; premi per rapida movo (R). 6. felo uzata



kiel vesto. — 7. daŭre resti sur la piedoj (R); voĉe eligi muzikajn sonojn (R). — 8. agrabla por la palato (R). — 9. ĝi estas ronda (R); oni faras ĝin el olivoj, arakidoj, k.t.p. — 10. malgranda. — 11. verŝi fluidaĵon en la buŝon (R); kovejo de birdo.

VERTIKALE. 1. disigi lignon (R). — 2. oni bezonas ĝin por vojaĝi eksterlanden (R). — 3. pagi por regule ricevi gazeton. — 4. deklari ion bona (R). — 5. sincere; prefikso. — 6. reprezentanto (R). — 7. el ties grajnoj oni faras farunon (R); membro (R). — 8. korpoparto. — 9. speco de silkajo (R). — 10. iri kun iu (R). — 11. trinkaĵo.

N-ro 58: KRUCVORTENIGMO. (laŭ la kadro de n-ro 57).

HORIZ. 1. eŭropa gento (R); apartenanta ekskluzive al iu (R). — 2. antaŭnomo de la persono troviganta sur vertikale 2. — 3. ĝi plibonigas kulturgrundojn (R); havigi (R). — 4. purigi (R). — 5. ame interparoli (R); fantazia rakonto (R). — 6. parto de la jaro (R). — 7. malbonkvalita afero (R); terkolo (R). — 8. oni ĝin trovas en Aŭstralio (R). — 9. metalhava ŝtonaĵo; atingi (R). — 10. malsama (R). — 11. titolo de verko, kiun la aŭtoro sur vertik. 2 esperantigis (R); devenigi vorton de alia (R).

VERTIK. 1. larĝa strato (R). — 2. esperantisto el la gento sur HORIZ. 1 kies stilo en la traduko sur HORIZ. 11 estas konsiderata kiel interesa eksperimento. — 3. speco de imposto (R). — 4. hinda landestro. — 5. malfacile solvebla (R); sufikso (R). — 6. ĝi igas la tranĉilojn tranĉi (R). — 7. subtilaj ertoj el tero (R); sufikso (R). — 8. flugi ĉirkaŭ io tien kaj reen (R). — 9. iri alten sur ion (R). — 10. abrupta movo de piedo (R). — 11. ĝi varmigas la manojn (R).

Sendu la solvo antaŭ la 20-2-1949 al la subaj adresoj: abonantoj N.E.: al s-ro Teunissen, Legmeerstr. 37 A.1., AMSTERDAM W.; anoj de FL.L.E.: al Postbus 342 (Enigmoj), BRUSSEL.

LA KONGRESO LEEN

Ci-jare ĝi okazos en *Haarlem*, dum la paskaj tagoj (16-17-18/4); ĉiam ĝi estas inda kaj interesa solenaĵo, ĉe kiu oni laboras, festas, dancas kaj ekskursas.

La *V.E.B.-anoj* estas nepre instigataj partopreni ĉi tiun okazaĵon en la *Bene-lux*-kadro kaj ankaŭ ĉar ili renkontos

multajn danojn. Ili do tuj skribu al la sekretario: S-ino M. De Witte-Dijkman, Junoplantsoen 119, zw. *Haarlem* (Ned.) Kongreskotizo: g. 2.75 aŭ -por unu tago-: g. 1.50. (Post la 13.48: plialtigo de g. 0.25).

HAARLEM.

Haarlem, bele situante proksime al la dunoj, *Norda Maro* kaj unuflanke limigita de arbaroj, estas la ĉefurbo de la provinco *Nord-Holando* (loĝantoj: 160.000)

La urbo estas unu el la plej antikvaj en *Nederlando*. Jam en la mezepoko ĝi estis unu el ĝiaj plej gravaj lokoj, en kiu la grafo de *Holando* havis sian restadejon. Antaŭ pli ol 700 jaroj *Haarlem* ricevis la t.n. urbajn privilegiojn.

Ĝi estis centro de la pentroarto. La nomoj *Frans Hals*, *Jacob van Ruydael*, *Philipp Wouwerman* kaj *Adriaan van Ostade* estas konataj en la tuta mondo. Sed ankaŭ la arkitektura majstro *Lieven de Key*, la kreinto de la *Vianthalo* (*Vleeschhal*) kaj *Pesejo* (de Waag) estis famkonata mezepoka burĝo de *Haarlem*.

Multaj konstruaĵoj atestas pri la malnoveco de la urbo. La urbdomo estis konstruita en la 13-a j.c. La gloro de *Haarlem* estas la Granda Preĝejo el la 16-a jarcento. Famkonataj estas ĝiaj orgeno, horejo kaj la grafaj tomboj. La nura bone konservita restaĵo de la iamaj fortikaĵoj estas la *Amsterdama Pordego*.

Ankaŭ la muzeoj estas vidindaĵoj unuarangaj. Kiu ne konas la *Frans-Hals*-muzeon? Estas fakto, ke multaj fremduloj pli bone konas la enhavon ol multaj *Harlemanoj*. Ĝi enhavas proksimume 300 pentraĵojn de *Frans Hals* kaj multaj aliaj majstroj. La *Teyler*-muzeo fondita en 1778 enhavas elektitan kolekton da mineraloj, natursciencajn instrumentojn, i.a. la elektromasilon de *van Marum*, famajn pentraĵojn, desegnaĵoj de *Michel Angelo* kaj grandan bibliotekon. La muzeo apartenas al la *Teyler*-fondaĵo, kiu estas konata en la tuta scienca mondo. La Episkopa muzeo konservas alt-

valorajn religiajn antikvaĵojn.

Haarlemmerhout (*Harlema Arbaro*), parte parko, parte arbaro, estas restaĵo de la grandaj arbaroj, kiuj en la mezepoko etendiĝis de *Alkmaar* ĝis *Hago*.

Karakterizaj por la urbo estas la multaj «*Maljunulinoj*» (*Hofjes*).

Meze de la bruo de la ĉiutaga vivo ili estas kvazaŭ oazoj en dezerto. Ekzemple *Proveniershofje* en la fino de *Grote Hautstraat* estas kvazaŭ vilaĝo en la urbo.

Krom la malnovajn konstruaĵojn *Haarlem* havas ankaŭ modernajn. La ĉefa estas la *Katedrulo* (nun *Baziliko*) konstruita de d-ro *Cuypers*.

La kanaligita rivero *Spaarne* serpentumas tra la urbon kaj sur kelkaj lokoj oni ĝuas belan panoramon, precipe sur la bordo de *Noorder Buiten-Spaarne*.

Oni nomas nian urbon «*florurbo*», kaj vere, ĝi meritas tiun nomon. Bele aranĝitaj parkoj plurloke ornamas la urbon. La iamaj remparoj nun estas belaj promenejoj, kvankam en la terura vintro 1944-1945 multaj arboj estis forhakataj por varmigi la domojn de la suferanta loĝantaro.

Kompreneble, ni tre, tre koncize prikskribis la loĝaĵojn kaj vidindaĵojn.

Multajn interesajn aferojn ni tute ne menciis. Plej bone do estas, mem veni al la urbo. Ĝi certe valoras la vojaĝon. Kaj kial vi ne venus?

Dum la paskaj tagoj ni kongresos tie kaj tiam vi havos sufiĉe da tempo por promeni tra la urbo. La L.K.K. zorgos, ke la kongresanoj povos rigardi ĉion, kion ili deziras. Ĝi organizos i.a. diversajn ekskursojn tra la urbo.

Vere, vizitu al *Haarlem*, vi certe ne bedaŭros! Ĉu ankaŭ vi venos?

Bone, Vi estas tutkore bonvena!

(14)

DEVENO & VIVO

DE LA LINGVO ESPERANTO

originale verkis: Petro Stojan

Kiel en ĉiu nacia lingvo — ankaŭ en Esperanto — estas distanco inter la skriba kaj la parolata lingvo; la skriba lingvo estas plejofte nur aro da literoj, imitanta la viditajn modelojn aŭ kutimojn de iu nacia lingvo; malofte ĝi respegulas la parol-lingvon.

La parol-lingvo, precipe kiam ĝi estas bone, flue, libere parolata, estas vera lingvo, malgraŭ sia arta deveno. Tia Esperanto estas pli natura ol iu ajn nacia lingvo en la fremdula nesperta buŝo.

Estas multaj samideanoj, spertaj propagandistoj, verkistoj, lingvuzantoj dum jardekoj, kiuj tamen restas sur la unua ŝtupo de komencantoj, por kiuj la parolata Esperanto estas fremda lingvo, por kiuj la ago paroli ĝin estas kvazaŭ pena, anguleca paŝado sur altaj iriloj, kun ceremoniaj gramatikaj reguladoj. Ili silabas, hakas la frazojn, pene tradukas ne nur sian penson, ankaŭ sian nacian frazformon... Tute alia estas Esperanto el fluparolanta buŝo: ĝi sonas kiel hejmlingvo, flueca, elasta, esprimanta la penson mem & nur la penson, per la ĉiaspeca kombinado de la elementoj, kiuj obeas al la parolanto, ilia mastro, sed ne katenigas lin, kiel fuŝkomencanton. En la unua kazo sonas homa naŝino kiu diligentas por ne produkti gramatikararojn... En la dua, libere parolas homo kiu elverŝas sian penson pere de obeanta mekanismo.

Laŭ Bergson, la arto de verkisto konsistas en tio ke li tiom lerte kombinas la vortojn, tiom ritme fluigas la frazojn, ke la leganto ne rimarkas la vortojn izolajn, absorbante la penson mem de la verkisto. Aplikante tion al Esperanto, ni povas diri, ke la granda arto posedi Esperanton konsistas en tio, ke la parolanto transverŝas sian penson al aŭskultanto, kiu ne rimarkas la parolan mekanismon, kiel aron da kune gluitaj izolaj radikoj & afiksoj... Male, la oficiala fuŝparolanto martelas ĉiun vorton, ĉiun frazeron, sur la kranioj de sia aŭdanto, kiu nete aŭdas la vorto-tamburadon, sed neklare kaptas la penson. La lingvo latina, alta ilo de la klasika civilizacio, kun sia grandioza literaturo & faka verkaro, tamen restas lingvo, morta, serviva, nenion diranta al la koro, sed miriganta la spertulojn per la komplika mekanismo kun miloj da risortoj, radetoj, prembutonoj, klipoj... Tia estas ankaŭ Esperanto por la pedantoj, kiuj ĝin precizege elernis per sia cerba mekaniko, sed kies koron ne penetris ĝia spirito. La plej alta grado kunigas la fluan buŝ-uzadon kun la emocia sentado. Se vi akre disputis en Esperanto, aŭ ame flustris en ĝi, vi jam sigelis la vortojn per la signo de la vera vivo... vi donis karnon al la radik-skeletoj... vi donis la vivon al la lingvo de Zamenhof.

Milionoj eklernis Esperanton... Centmiloj ĝin mekanike & cerbe studis... Nur nemultaj adeptoj ĝin ekposedas.

La vivo de Esperanto daŭras nur tiom, kiom ekzistas liberaj homoj, kiuj en tiu lingvo pensas, laboras, parolas, kantas, amas & malamas. Kaj tiu vivo ne dependas de la registaraj aproboj, nek de la oficialaj deklaraĵoj, kiuj aperas & malaperas sen postsignoj, kiel falantaj folioj dum aŭtuna ventado. Sed la arboj restas. Printempe aperos novaj folioj... Esperantujo do similas al la profunde radikintaj arboj, kies kolektiva vivo formas la veran vivon de nia lingvo.

* * *

Nun ni jam estas preparitaj por ĵeti rigardon al la lasta kaj plej grava demando: Kiu evoluigas la lingvon? Korekta respondo al tiu demando donas klaran solvon de ĉiuj nunaj ĝenoj, duboj, hezitoj. Unue, ni konstatis ke Zamenhof ne donis al ni la direkton por progresigi Esperanton; li nur kungluis negobulon, lancis ĝin sur deklivon, kaj kriis al ni: «helpu, puŝu ĝin plu...!»

Kaj la bulo ruliĝas, kreskas, estas puŝata per manoj, iom senorde, laŭhazarde... Due la verkaro de Zamenhof — lia skribita heredaĵo — ne indikas la vojon, nek respondas multajn elementajn demandojn, aŭ respondas ilin hezite, oble, sfinske. Trie, ni vidis ke la L.K. ne celas nin gvidi, ĉar ĝi okupas pozicion de neutra observanto, kiu eble notos niajn akirojn, sed kiu lasas al ni — teorie — liberecon. Se nia lingvo pretendas evolui kiel ĉiu vivanta natura lingvo, ni vidu do kiel progresas natura lingvo, kiu ĝin evoluigas.

La natura lingvo evoluas pro la senhalta uzado, pro la vivpostuloj, pro la multegaj homoj, kiuj ĝin parolas. Sed, kiel socia ilo, la lingvo emas konservi sian unuecon, identecon, por servi kiel klara interkomprenilo. Do, la popolo ĝin fidele uzas, infanoj imitas gepatrojn, lernantoj imitas profesorojn, servistoj imitas mastrojn. Tiel funkcias la lingvo entute, rigardata de malproksime. Sed jen, iu individuo — ŝerce aŭ «erare» — ŝanĝetis unu vorton, mallongigis ĝin, aŭ faris ĝin pli belsona, la aŭdintoj ridis, tio plaĉis, kaj en tiu grupeto, familio aŭ vilaĝo, la nova vorto iĝas moda, oni ĝin volonte ripetas. Poste ĝi infektas najbarojn, najbarajn urbojn kaj, fine, la tuta nacio ĝin uzas. La rapideco de tia vastigado dependas de la politika kaj socia trafiko: kazerno, lernejo, gazetaro, povas rapide enkonduki trafan novaĵon.

Tion ni vidas preskaŭ ĉiutage. Hieraŭ oni diradis «fotografio», «stenoĝrafio», «gimnastiko»... morgaŭ oni diros «foto», «steno» «gimno»... (tiel okazis vere en kelkaj naciaj lingvoj en la periodo 1900-1920). Antaŭ duonjarcento, iu knabino franca, ĉe la pordo de Belarta Lernejo, diris erare, aŭ kaprice: züt... (anstaŭ züt, t.e. silentu) kaj ŝiaj amindumantoj ekkaptis la novnuancan vorteton, kiu nun estas en oficialaj leksikonoj. Alia ekzemplo de absurda, sed spirita individua novaĵo, kiu eble neniam adaptiĝos, sed kiu bone ekzemplas ke instinkto povas subite, preskaŭ kontraŭvole, krei mirindajn formojn. En Targu-Mureŝ vigle funkciis esperantista grupo; en la sama urbeto vivis iu stranĝulo, nekomprenbla tipo, kiun la grupanoj ŝerce nomis «kvankamulo», kaj vere tiu absurda vorto bonege karakterizis, per sia absurdeco mem, tiun strangulon. Franca knabineto trijara, dezirante diri: «malproksimumu min de la tablo», diris laŭ subita inspiro: *déprochez-moi*... (tiel kreante novan vorton, analogie kun: *approchez-moi*). Se iu infano en esperantista hejmo dirus: *pluvelo* (pluvombrelo), lia kreaĵo eble antaŭdivenus la estontan vorton.

Nun ni bone notu, ke ĉiu novaĵo en la lingvo estas kreata individue, per ago de izola persono; nur poste la kolektiva uzado ĝin elprovas, forlasas aŭ adoptas. Kaj fine — post la praktika adopto — estas por ni indiferece, ĉu kaj kiam iu institucio bonvolos ĝin enregistri en siaj dokumentoj, meti sur ĝin la stampon «permesita», «aprobata» aŭ «oficiala». Tiaj formalajoj ne gravas por la vivo.

En fina resumo, do ni vidas, ke la vivportantoj de la lingva progreso estas apartaj individuoj, — talentaj poetoj, lertaj verkantoj, spritaj babilantoj, eĉ instinktoricaĵaj infanoj, kiuj meritas nian dankemon, amon kaj protekton. Ne malhelpi ilin, ne minaci ilin per dikaj gramatikoj, — sed kuraĝigi ilin en ilia krea agado ni devas. Do, la progresema parto de la esperantistaro

laŭte diru al ili: vivigu la lingvon, libere uzu ĝin laŭ via gusto, kreu sentime mil novaĵojn, kaj ni imitos vin en viaj trafaj elpenoj! Car entute, *via instinkto ne eraras*, ĝi amas la ĝojn de kreado, kaj tio garantias al ni la bonegecon de la produktoj. *Akbar la Granda* proponis al filozofo desegnititan linion, dirante: malgrandigu ĝin, sed nenion detruante, nenion tuŝante en ĝi. Kaj la filozofo desegnigis super la unua linio la duan, pli longan! Simila estas la tasko de niaj fajrantaj amikoj. Ili ne tuŝos al dikaj oficialaj volumoj, nek al centmembraj akademioj... Ili ne volas tuŝi tiun grandan ŝanceliĝantan turon — sed apud ĝi ili konstruos ion pli altan: la vivantan templon de la homara lingvo. Ni lasu ilin konstrui, ni apogu kaj estimu ilian fervoron; jam sole tio povus justigi nin en la okuloj de venonta generacio. Sed feliĉa estas, kiu mem povas partopreni kaj alporti sian ŝtonon al la kolektiva laboro. Ĉar la plej granda feliĉo estas en la ĝoja kreado.

KREANTOJ DE LA LINGVO.

Ne ĉiuj povas veni al internacia kongreso aŭ renkontiĝi kun parolantaj samideanoj. Sed ĉiu havas la eblecon korespondi, legi, traduki kaj verki. Kaj tion faras la plimulto.

Kio estus gazeto sen legantoj — eldonisto sen aĉetantoj? Kio fariĝus novuloj, se ili ne trovus bonvolajn plispertajn korespondantojn? Kiel ekzistus niaj gazetoj, ne sufiĉe riĉaj por pagi kunlaborantojn, se ne ekzistus sinoferaj tradukantoj kaj verkantoj?

En ili ĉiuj estas kaŝita la ĉefa forto de nia lingvo. Per ilia senbrua laboro kreskas Esperanto, treege malrapide, sed certe, kiel fariĝas rokoj kaj koralaj insuloj en la mara fundo. Je unu presita artikolo estis cent rifuzitaj. Je ĉiu rifuzita manuskripto, resendata de la redakcio, estas dek, cent aliaj, ne senditaj, kaj eble neniam sendotaj. Neeblas imagi al si la tutan cerban laboron, kiu fariĝas ĉiumomente en Esperantujo. Oni preskaŭ ne konas ĝin kaj ĝi tamen estas granda kaj forta kiel montaro. Dum la solenoj, festoj, kongresoj, oni multe bruas, komplimentas, laŭdas kaj laŭras — tamen tio estas nur saŭmo sur la mara supraĵo, kiu diras pri la energia ondado, sed ĝi mem ne estas tia.

Komencante de novuloj, kiuj unuafoje silabas fraze-rojn en Esperanto, pasante tra lernintaj adeptoj, ni alvenas al elito, koro kaj cerbo de Esperantujo, al fortaj poetoj, esperanto-majstroj. Tiel ni supreniras de la bazo de piramido ĝis la pinto, el kiu nia penso povus ĉirkaŭrigardi la tutan konstruaĵon.

En la realeco tiu granda amikaro ne staras senmova, sed ĉiumomente moviĝas, kiel grandioza fontano, kies akvogarbo konservas sian formon, sed kies flua substanco ĉiumomente renoviĝas: unuj gutoj falas, dum aliaj suprenkuras, ilin anstataŭante. Kie nun estas la unuaj miloj da pioniroj, kiuj formis la lingvon antaŭ kvardek jaroj? Preskaŭ neniu el ili restis! — Sed la fiuanta piramido daŭre funkcias, en proksimume sama cikla irado.

De temp-al-tempo, tiu aŭ alia teoriulo volas devojigi laŭ sia plaĉo tiun moviĝantan amaron, kiu kun infana — obeemo sekvas la trudatan vojon, dum unuaj paŝoj, sed poste haltas, lasante la teoriulon plu kuri sola, dum la amaso reprenas malnovan direkton, diktatan de la instinkto senerara.

FINO